

N. N. 02,  
Soldatenlied

1. Wo soll ich mich hinwenden  
in dieser schlechten Zeit.  
An allen Orten und Enden  
ist nichts als Haß und Streit.  
Rekruten fanget man,  
soviel man haben kann.  
Soldat muß alles werden,  
sei einer Knecht oder Mann.

2. Mit List hat man mich g'fangen,  
als ich im Bette schlief,  
da kam der Hauptmann 'gangen,  
ganz leise auf mich griff:  
"Ei Bruder! Bist du da?  
Von Herzen bin ich froh!  
Steh' auf, Soldat musst werden,  
das ist nun einmal so!"

3. So bin ich nun gefangen,  
mit Eisen angelegt.  
Als wäre ich durchgegangen,  
so hat man mich belegt.  
Ach Gott, verleih' Geduld,  
ich bitt' um deine Huld!  
Mein Schicksal will ich tragen,  
vielleicht hab' ich's verschuld't.

...

N. N. 02,  
Soldatokanto

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

1. Turniĝi kien mi povus  
en tiu trista temp' ?  
En ĉiu loko sin trovus  
milit' kaj malkontent'.  
La rekrutiga band',  
nin ĉasas en la land'.  
Soldato ĉiu fariĝu:  
servisto kiel vagant'.

2. En nokto ili alvenis  
kun ruz' al mia lit'.  
La leŭtenant' min ekprenis,  
ne eblis plu evit'.  
"Ekstaru, pigra frat',  
vin vokas via ŝtat'.  
Soldatojn ni bezonas,  
ne eblas iu kompat'."

3. Mi marŝas en katenoj  
simile al kaptit'.  
Batate sub malbenoj,  
mi stumblas al milit'.  
Ho, Dio, gardu min,  
mi ege petas vin!  
La sorton mi akceptos,  
mi eble kulpas ĝin.

...

4. Der Kaiser hat beschlossen,  
 zu ziehn in fremdes Land.  
 Viel Krieger werden erschossen,  
 getroffen von Feindes Hand.  
 Das ist der Kriege Lauf,  
 Regenten steigen auf.  
 Vieltausend von uns  
 müssen ihr Leben geben drauf.

5. Dem König muss ich dienen,  
 so lang ich's Leben hab'.  
 Werd' ich einmal erschossen,  
 wirft man den Leib ins Grab.  
 Allwo in einer Schicht -  
 ach Gott erbarme dich! -  
 viel Kamerad begraben,  
 vielleicht betrifft's auch mich!

6. Man hört Kanonen knallen,  
 dass es die Luft erschallt.  
 Viel tausend Brüder fallen,  
 verlieren ihr' Gestalt.  
 seufzen in ihrem Blut,  
 das stromweis fließen tut,  
 müssen den Geist aufgeben,  
 o du unschuldig's Blut!

...

4. La reĝo nun decidis,  
 ke estas do milit'.  
 Soldatojn oni mortigas  
 batale sen hezit'.  
 Militoj voras nin,  
 rekrutojn kiel min.  
 Milmiloj devas morti,  
 sur kampoj sternas sin.

5. Por l' reĝo mi batalos,  
 ĝis mi ne vivos plu,  
 ĝis mia korpo falos  
 en tombon en la fru'.  
 Jen la soldatofin'!  
 Ho, Di', kompatu nin!  
 Tre multaj jam formortis.  
 Kaj kiam trafos min?

6. Se la kanonoj knalas,  
 ekstremas la aer'.  
 La kamaradoj falas  
 kaj sinkas al la ter'.  
 Ĝemad' el ĉiu flank'  
 en la soldata rang'  
 Torentoj ruĝaj fluas.  
 Ho, vi senkulpa sang'.

...

7. "Adje nun, Vater, Mutter,  
 adje, mein lieber Freund!  
 Muss mich zur Reis' begeben,  
 zur Residenz noch heut'.  
 Der Himmel schütze euch!  
 Wann ich im Feld bleib',  
 betet für meine Seele,  
 dass ich komm' ins Himmelreich!"

8. "Ach Vater, Schwester, Bruder,  
 stellt euer Weinen ein!  
 Es kann nicht Anders helfen,  
 Soldat' muss ich jetzt sein.  
 's regieret in der Welt  
 die Falschheit und das Geld.  
 Der Reiche kann sich helfen,  
 der Arme muss ins Feld."

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 02.*

*Arg-134-265 (2005-02-05 19:34:50)*

*Dieses Lied, dessen Verfasser unbekannt ist, stammt wahrscheinlich aus dem 18. Jahrhundert. Die erste, vierte und achte Strophe ist nachzulesen im Internet unter "http://www.molwert.de/Lieder" Dort ist auch die Singweise angegeben, die man über einen Audio-Anschluss abhören kann.*

7. "Adiaŭ nun, familio,  
 amik', doloras tre,  
 Mi devas nun, ĉe Dio,  
 al nia rezidej'.  
 Se restos kampe mi,  
 preĝu por mi al Di'.  
 Ĉielen Li min prenu,  
 animon mian al si."

8. "Ho, patro kaj gefratoj,  
 do jam ne ploru min.  
 Mi marŝas kun soldatoj,  
 ne eblas ŝanĝi ĝin.  
 Regas en tiu sfer'  
 nur mon' kaj malsincer'  
 Riĉuloj restas hejme,  
 soldatojn kovros ter'."

*Traduko de la Germana poemo "Soldatenlied" de N. N. 02 en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-134-266 (2005-02-03 11:12:06)*

*Tiu ĉi germana poemo, kies verkinto estas nekonata, ekestis verŝajne en la 18a jarcento. La unua, kvara kaj oka strofoj troveblas ekzemple en la interreto en "http://www.molwert.de/Lieder". Tie troviĝas ankaŭ la melodio de la kanto, kiun oni povas ekaŭdi tie pere de aŭdio-konektilo, se oni alklakas sur la koncerna ttt-pagho la suban ŝaltilon.*